Aŭstraliaj Esperantistoj

Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO KAJ NOVZELANDO

http://beta.visl.sdu.dk/lingvohelpilo/

PLENUMITA 19/08/2015 Ducent tridekunua eldono19/08/2015 SENDITA (unua eldono 20/09/2011)

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;



Redaktoro Roger Springer Provlegita de Nicole Else



SENDATA AL 304 La informa kaj noma paĝoj reaperos nur en la dekaj eldonoj

Brunaj literoj signifas reuzatan sed gravan informon **ABC malnova**

Nigraj literoj signifas novan aŭ ĝisnunigitan informon **ABC nova**


Ctrl+alklaku la verdajn lokojn, aŭskultu, rigardu la Esperantajn ligojn

Ctrl+alklaku la bluajn lokojn, aŭskultu, rigardu la Anglajn ligojn

Ĉiuj „Aŭstraliaj Esperantistoj" atingeblas je la suba adreso

http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★



Esperanto-ŝlosilo Uzu, fordonu, semu Esperanto-semojn. Memoru ke ĝi celas esti propaganda libreto ne instru-libreto. http://aea.esperanto.org.au/sxlosilo/?lang=eo

★★★★★

84. LA GRAMATIKO DE ESPERANTO



Adjektivoj faritaj el Verboj. C.

Jen do kelkaj el la elverbaj adjektivoj kun ĉies signifo uzata el la tri eblaj: Kritika = kritikanta = "la kritika ĵurnalartikolo"; konfuza = konfuzita = "la konfuza ĉefministro"; admira = admiranta = "admira vizitanto"; alterna = alternanta = "alternaj parolantoj"; aga = priaga = "la aga parto de ekskurso"; aproba = aprobanta = "ŝia aproba jeso"; akompana = akompananta = "la akompana gvidisto"; akuza = akuzanta = "akuzaj atestantoj"; ama = priama = "ili havas amajn rilatojn"; amuza = amuzanta = "amuzaj rakontoj"; apartena = apartenanta = "miaj apartenaj kontoj"; aplaŭda = priaplaŭda = "aplaŭda bruo"; komplika = komplikita = "komplika murdkazo"; falsa = falsita = "falsaj akuzoj".

Daŭrigota. Marcel Leereveld.



Novaĵoj pri la Esperanto-Doma Gastdormejo

La **GASTDORMEJO** devas esti antaŭmendita de estontaj Esperantistaj gastoj.

Sendu ĉiujn petojn por resti en la gastdormejo al la Sekretario per

retmesaĝoj al: gymea@hotmail.com; rspring@tpg.com.au; **kaj** nsw@esperanto.org.au;
Lyudmila (KELLOWAY) alvenos la 24-an de aŭgusto kaj foriros la 31-an.
Trevor Steele alvenos vendredon la 28-an de aŭgusto kaj foriros lundon la 31-an
Ambaŭ invititoj de la Sidneja Lingva Festivala Asocio por partopreni en la 2015 Festivalo.

Estas pli ol 98,000 lernantoj en la Esperanto-kurso de Duolingo.
https://www.duolingo.com/ en nur 12 semajnoj (ekde 28a de majo)

Ĉi tiuj Semajnfinaj Esperantaj Kunvenoj ANZ-Esp-Kluboj

Elsendata ĉiun vendredan vesperon. Se vi reklamus vian venontan kunvenon ĉi tie, eble venus vizitantoj. *Ne Forgesu sendi informon*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★



La Manlia Esperanto-Klubo.

Anoj kunvenas ĉiujn unuan kaj trian Sabaton. La venonta kunveno estos la 5an de septembro de la 10-a ĝis la 12-a Bavarian Beer Cafe, Manly Wharf; Unu taso da senpaga kafo.

La 15an de aŭgusto venis kvin : Roger, Chris, Ian, John kaj Eunice. Poste ni manĝis ĉinan lunĉon ĉe la domo de Roger.

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

La Brisbana Esperanto-Societo

Anoj kunvenas la trian aŭ kvaran sabaton de la monato. 11atm
www.meetup.com/Brisbane-Esperanto-Society/



" Lastan semajnfinon Toowoomba festis la dekan Lingvan kaj Kulturan Festivalon" kaj membroj de la Toowoomba kaj Brizbana Esperanto Societo partoprenis.
Ili organizis informadon, elmontron kaj aktivecan tablon por multaj infanoj.
Ni parolis kun vizitantoj de multaj landoj, kelkaj estis iam Esperanto-parolantoj.
Kelkaj vizitantoj esprimis intereson por Esperanto-lingva klaso en la urba biblioteko. Amike, Petro Danzer

Esperanto-Domo Sidnejo



Merkredojn la 5an kaj 12an de Aŭgusto venis Roger Springer kaj Ian Wylles. Ni aranĝis Vendredan rendevuon kun riparisto de TPG por ripari la interreton ĉe Esperanto-domo. Roger veturis per la vendreda pramŝipo je la 6:10atm kaj bonŝance alvenis al ED je la 7atm. (la horo arangîta por TPG). Ian alvenis je la 7.30atm kaj la riparisto alvenis je la 10atm. Longa tago. Roger Springer

Trevor Steele prelegos ĉe Esperanto Domo 29an Aŭgusto vespere


EFNSW evento 6ptm ĝis 8ptm. (Inter la 2 tagoj de la Lingva Festivala Asocia Evento 2015


Malkovru Sidnejon tra la okuloj de franca artisto


Jen desegnoj de mia patrino pri Sidnejo kun komentario en Esperanto.
https://www.youtube.com/watch?v=zkI9Mrvgnjs
Lilli Giloteaux, franca esperantistino ofte vizitis Sidnejon (Aŭstralio). Ŝi multe pentris kaj desegnis kaj kreis libron manskribitan kaj mandesegnitan kun proksimume 100 desegnoj.
La teksto estas laŭtlegita de la filino de Lilli Giloteaux

Amike, Nicole















La nombro da paĝoj en la novaĵletero dependas ĉu aktivuloj sendas novaĵojn aŭ ne.
Se vi ne sendas informojn, neniuj scias pri viaj kluboj aŭ pri via ekzisto.

La Klubaj Kontribuantoj al la Novaĵletero

Aŭstraliaj Esperanto-Kluboj	202	203	204	205	206	207	208	209	210	211	212	213	214	215	216	217	218	219	220	221	222	223	224	225	226	227	228	229	230	231
AEA informas		■			■			■			■			■				■			■		■							
Aliaj Landaj kontribuantoj						■					■			■								■		■			■	■	■	
Brisbana Esperanto-Kafo-Klubo														■		■														
Brisbana Esperanto-Societo											■					■		■												■
Centra-Marborda Esperanto-Klubo					■							■						■	■		■									
Kanbero Esperanto -Kafo-Klubo																						■								
Manlia Esperanto-Klubo			■		■		■				■		■		■		■			■		■		■	■	■		■		■
Melburna "Meetup" Grupo	■																													
Melburna Esperanto-Asocio		■							■		■					■		■	■		■		■	■						
N.S.K Esperanto-Federacio	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■		■		■	■		■				■				■		■
Noumea Klubo (NovKaledonio)	■	■																												
Okcident-Aŭstralio Esperanto-Ligo																														
Sudaŭstralio		■								■	■	■							■	■				■					■	
Tasmania Esperanta Societo																														
Toowoomba Esperanto-Societo														■		■														
Torkia Esperanto-Kafo-Klubo																														
Viktorio Esperanto-Federacio																														
3ZZZ Esperanto-programo												■	■	■	■		■	■		■	■	■	■	■						
	30	29	28	27	26	25	24	23	22	21	20	19	18	17	16	15	14	13	12	11	10	9	8	7	6	5	4	3	2	1

"Informu AE, se estas eraro en la listo" rspring@tpg.com.au

Eĉ mallonga raporto kaj foto informas ke via klubo ekzistas

Sydney Language Festival Association 2015

Posted in Language Festivals

SYDNEY LANGUAGE FESTIVAL

This 2-day event will be held on Saturday 29th and Sunday 30th of August, 2015. The purpose of the festival is to show the great diversity of languages in the world and to demonstrate that all languages are equally important and valuable. This year our co-organiser is Australian Esperanto Association. At Redfern Community Centre (Saturday 29th) and Bondi Pavilion (Sunday 30th)

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★